WIKIPEDIA

Bacba lingvo

La **Bacba Lingvo** (ankaŭ nomate **Bac**, **Baci**, **Bacbi**, **Bacb**, **Bacaŭ**, **Cova-Tuŝ**) estas la lingvo de la Bacba popolo, Kaŭkaza malplimulto. Ĝi havis inter 2 500 kaj 3 000 parolantojn en 1975.

Estas nur unu dialekto. Ĝi ekzistas nur kiel parolata lingvo, ĉar la bacba popolo uzas la Kartvelan kiel sian skriban lingvon.

Bacba lingvo	
ბაცბურ მოტ bacbur mott	
Parolata en	Kartvelio
Regiono	Zemo-Alvani en Kaĥeti
Parolantoj	3 420 (2 000 WCD)
Skribo	sen valoro
Lingvistika klasifiko	
Kaŭkaza *(disputata)*	
Nordorienta	
Naĥa	
Batsba	
Lingva statuso	4 severe endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	cau
ISO 639-3	bbl
Glottolog	bats1242
Angla nomo	Bats
Franca nomo	bats

Enhavo

Klasifiko

Historio kaj geografia distribuo

Gramatiko

Morfologio

Fonologio

Vokaloj

Konsonantoj

Eksteraj ligiloj

Klasifiko

La bacba apartenas al la naĥa familio de kaŭkazaj lingvoj (vidu la artikolon naĥoj). La lingvo estas ne reciproke interkomprenebla kun la ĉeĉena nek kun la inguŝa, la aliaj du membroj de la naĥa grupo.

Historio kaj geografia distribuo

Ĝis la mezo de la 19-a jarcento, la bacboj loĝis en Tuŝetio, la monta regiono de Nordorienta Kartvelio. La Cova Montfendo en Tuŝetio estis priloĝata de kvar bacbaj komunumoj: la Sagirta, Otelta, Mozarta kaj Indurta. Poste ili setlis sur la Kaĥetian Ebenon, en la vilaĝo Zemo-Alvani, kie ili ankoraŭ restas. Administre ili estas parto de la Aĥmeta distrikto de Kartvelio.

Plej multaj parolantoj de la bacba loĝas en la vilaĝo de Zemo-Alvani, sur la Kaĥetia Ebeno, en la Aĥmeta distrikto de Kartvelio. Estas iuj familioj de bacboj en Tbilisi kaj aliaj pli grandaj urboj en Kartvelio.

Gramatiko

Morfologio

La bacba havas ok substantivajn vortklasojn, (genrojn), la plej alta nombro inter la kaŭkazaj lingvoj. La bacba ankaŭ havas eksplicitajn fleksiojn por agenteco de verbo; ĝi faras distingon inter *as woʒe* "Mi falis suben" (ne proprakulpe) kaj ***so woʒe*** "Mi falis suben" (proprakulpe).

Fonologio

Vokaloj

Vidu http://titus.fkidg1.uni-frankfurt.de/didact/caucasus/kaukvok.htm#Bats

Konsonantoj

Vidu http://titus.fkidg1.uni-frankfurt.de/didact/caucasus/nekklaut.htm#batsbi

Eksteraj ligiloj

- La Ruĝa Libro de Popoloj de la Rusia Imperio: La bacboj (http://www.eki.ee/books/redbook/bats.shtml)
- Ethnologue raporto pri la bacba (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=bbl)
- Raporto pri la Lingvoj de la Monda (http://languageserver.uni-graz.at/ls/lang?id=3048)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Bacba_lingvo&oldid=5890504"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 10:49, 11 feb. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.